

**11/Magazeno "Vaxelaire & Cie"** 1901 13 rue Raugraff.  
Arkitektoj : Charles André, Emile André kaj Eugène Vallin.



Inter 1927 kaj 1930, tiu konstruaĵo estis tre modifiita de la arkitekto Raphaël Oudeville. Hodiaŭ, postrestas nur du intertraboj kaj farbo kaŝas la naturan koloron de la mahagono kaj la emajlitan bluan grejson de la medalionoj.

**12/Domego de Doktoro Aimé** 1903

42-44 rue Saint-Dizier.

Arkitektoj: Georges Biet kaj Eugène Vallin.



La restaŭrado de la teretaĝo ebligas restarigi la du grandajn arkadojn similajn al papiliaj flugiloj.

**13/Magazenoj "Vaxelaire kaj Pignot"** 1903 53-57 rue Saint-Dizier.

Arkitekto : Lucien Weissenburger.



La origina konstruaĵo estis profunde modifiita ; Nur la superaj niveloj de la fasado postrestas, interalie la kartuŝoj, kie oni povas vidi monogramon (V kaj P) kaj devizon de la mendiantoj ("Mia honesto faras mia forton").

**14/Domo "Arnoux-Masson"** 1911-1913

24 rue Saint-Dizier.

Arkitekto : Louis Déon.

La lignotegaĵo el mahagono de la fasado kaj la ferornamaĵo de la pordo montras pinglojn kaj konusojn de pino.



**15/Banko "Crédit Lyonnais"** 1901

7 bis-9 rue Saint-Georges.

Arkitekto : Félicien César.

Tegmentvitralo : Jacques Grüber.




La klasikstila fasado kaŝas vastan akceptejon, lumigitan per granda vitrotegmento pli ol 250 m<sup>2</sup> area. Centre, medaliono enhavas monogramon de la banko kaj la ĉirkaŭaĵo estas ornamita de klematidoj.

**16/Apoteko " Ginko "** 1915 38 rue des Dominicains.

Arkitekto : Paul Charbonnier.

Interna ornamaĵo : Louis Majorelle.



Tiel nomita pro la ginko, kiu ornamas la montrofenestron. Interne, la meblaro estas el mahagono ; brionio kaj dolĉamaro estas uzitaj por la ornamaĵo.

**17/Magazeno "Goudchaux"** 1901

4 rue des Dominicains .

Arkitekto : Eugène Vallin .



Hodiaŭ, postrestas nur la bendo el blonda mahagono ornamita de garbo de umbeloj.

**18/Domego "Camal"** 1904-1905 5 rue Saint Julien.

Arkitekto : Emile André.

La metala strukturo de la plankoj ebligas la realigadon de tre larĝa montrofenestro, kiun arko simila al korbanso surstaras.



**19/"Casino des Familles"** 1902

7 rue Saint-Julien.

Arkitekto : Louis Lanternier kaj Ferdinand César.



La unua parto (tri intertraboj maldekstre) estis konstruita en 1902, kiam la dua parto dekstre, en 1911. La stilo estas klasika, tamen la influo de la Nova Arto estas videbla en la ornamaĵo.

# Nova Arto en Nancio

## La itineroj

Ĉirkaŭ 1900, Nancio tutmonde famiĝis pro la Nova Arto kaj ĝiaj artistoj, kiuj inspiriĝis el la vegetaloj kaj el la sciencoj.

Tiu movado, nomita "Nancia Skolo", naskiĝis, kiam Alzaco kaj Mozelo estis aneksitaj de Germanio.

El tiuj departementoj, alvenis multaj artistoj, industriistoj kaj entreprenistoj, kiuj renovigis la ĉiutagan vivon en diversaj fakoj (mebloj, artobjektoj, vitraĵo, vitralo, ledο, ceramiko...).

Privataj domoj, bankoj, magazenoj atestas la altnivelan talenton de la nanciaj artistoj.

## Itinero n°1

### La Negocokvartalo



Ekde la placo "Maginot" ĝis la placo "Stanislas", la promenejo montras la ejojn de la ekonomia vivo ĉirkaŭ 1900 : magazenoj, ĵurnaleldonejo, hoteloj, biertrinkejo, spektaklejo...

La Nancia Skolo ekspluatis la teknikajn progresojn, la plejbonecon de la ornamitaj artoj kaj la metiaĵon por stampi en ŝtono, metalo, vitro kaj ligno, la iniciatemon de la aferuloj.

## 1/"L'Est Républicain" 1912 5 bis avenue Foch.

Arkitekto : Pierre Le Bourgeois.



Konstruita el armita betono por la eldono de la ĵurnalo ; la fasadoj kun siaj regulaj intertraboj signas revenon al klasikstilo, malgraŭ floraj ornamaĵoj.

## 2/"Les Magasins Réunis" Aktuale Printemps kaj Fnac

2 avenue Foch.

Arkitekto : Pierre Le Bourgeois.



Unua domego konstruita laŭ la stilo "Nancia Skolo", detruita en 1916, dum la unua mondmilito poste rekonstruita en 1925 laŭ

la stilo "Art déco".

## 3/Banko "Varin Bernier" 1906-1909 4 Place Maginot.

Arkitekto : Joseph Hornecker.

Ferornamaĵoj : Edgar Brandt.

Nun postrestas nur parto de la instalaĵo kaj de la ornamaĵo de la kofroĉambro.

## 4/"Poirel" 1889 5 rue Victor Poirel.

Arkitekto : Albert Jasson.



Victor Poirel estas antaŭvidanto kiam li revas, fine de la 18a jarcento, kulturejon (koncertejon, artmontrejon kaj tiam muzikan konservatorion) en la kreskanta kvartalo de la stacidomo.

La stablo, inaŭgurita en 1889 en ĉeesto de famuloj (Emile Gallé, Victor Prouvé, Louis Majorelle, Emile Friant...), estis tuj sukceso.

## 5/Biertrinkejo "Excelsior" 1910

1-3 rue Mazagran.

Arkitekto : Lucien Weissenburger kaj

Alexandre Mienville.

Vitraloj : Jacques Grüber.

Skulptaĵoj : Léopold Wolff.



Konstruita en armita betono kaŝita per ŝmiraĵo por esti

reklamo de la bierfarejo "Vézélise"; La fasado memorigas la skolon de Vieno ; interne, la kurbaj linioj kaj la vegetalaj ornamaĵoj estas karakterizaj de la stilo "Nova Arto". La vitraloj ornamas per filikoj (ankaŭ sur la stukita plafono), pinoj kaj folioj de ginko, la grandajn aperturojn. Meblaro el mahagono akordas kun lignotegaĵo el tamarindo. Planke, mozaiko desegnas palmfoliojn.

Multaj lustroj, murlampoj kaj lumĵetiloj lumigas la salonon.

## 6/Domego "Margo" 1906 86 rue Stanislas.

Arkitektoj : Eugène Vallin kaj Paul Charbonnier.

La rondaj formoj de la elstaraj balkonoj (bow-window) kaj la vegetala ornamaĵo de la kradoj kaj de la trumo (konvolvuloj) estis harmoniaj.



## 7/Domo de komerco kaj industrio 1908

40 rue Henri Poincaré.

Arkitektoj : Emile Toussaint kaj Louis Marchal.

Vitraloj : Jacques Grüber.

Ferornamaĵoj : Louis Majorelle.



La fasado relative klasika, tamen montras vegetalajn ornamaĵojn en murmoduloj kaj en ferornamaĵoj de la pordego, balkonoj kaj markezo (acero, kverko kaj kardo).

Du el kvin mirindaj vitraloj montras pejzaĝojn (lorenan kaj vogezaŭ) kaj la aliaj memorigas la lorenan industrian : vitrolaboro (vitroblvisto antaŭ fornego), ferindustrio (ministo puŝanta vagoneton da erco) kaj bierfaro (portreto de Pasteur esploranta fermentadojn en laborejo "Tourtel" en "Tantonville").

## 8/Domo "Houot" 1907 7 rue Chanzy.

Arkitekto : Joseph Hornecker.

Skulptaĵoj : Emile Surmely.

Mendita de Philippe Houot, notario, tiu konstruaĵo estas inspirita de la kalsikstilo, sed vegetalaj ornamaĵoj atestas la novartan stilon : konusoj kaj pingloj de pino sur pordo, balkonoj, korniko, kartuŝo, lukoj kaj bazo de kameno ; ginko en la balustrado de ŝtuparo.



## 9/Banko "Renauld" 1910 9 rue Chanzy.

Arkitektoj : Emile André kaj Paul Charbonnier.

Ferornamaĵoj kaj meblaro : Louis Majorelle.



Situanta angule de stratoj, la konstruaĵo montras karakterizan turo-antaŭpordon aksasimetrie konstruitan. La metalaj ringoj de la tri antaŭpordopilieroj estas ornamitaj per folioj de ginko, kiuj estas ankaŭ videblaj en la ferornamaĵoj de la balustradoj.

Sur la fasado, supre de la fenestroj de la teretaĝo, la linteloj estas ornamitaj de skulptita friso kun pomoj kaj ilia foliaro.

Je la 4a nivelo, friso de lekantoj ĉirkaŭas la turon. Aliaj floroj kaj folioj de filiko superelstaras tiun frison. Oni retrovas tiujn floran ornamaĵojn sur la balkonoj.

La vertikalaj linioj descendantaj tra la intertraboj de fenestroj estas kompensitaj per la horizontalaj partoj tiaj la balkonoj kaj la kornikoj.

Interne, oni abunde retrovas la vegetalajn ornamaĵojn en lignaĵaro, ferornamaĵoj, vitraĵoj kaj skulptaĵoj. Ĉefe estas la lunario aŭ papmono, kiu memorigas la fakon de la loko.

## 10/Semvendejo "Génin" 1901 2 rue Bénit.

Arkitektoj : Henri kaj Henry Gutton.

Vitraloj : Jacques Grüber.

Ceramikoj : Alexandre Bigot.



Sola domego en Nancio kun metala (nitita ŝtalo) strukturo videbla, ĝi estas tipa de la raciisma movado reprezentita de Viollet-Leduc.

La du unuaj etaĝoj, tute vitritaj, estis uzataj kiel magazeno. Angule de la aliaj etaĝoj, estas elstaraj balkonoj, kiuj montras (same al la malsupraj aperturoj), abundan forĝitan ornamaĵon kun floroj kaj fruktoj de papavo.

Ceramika friso kun la sama ornamaĵo, situanta malsupre de la elstaraj balkonoj, plilongiĝas sur la fasado.